## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen denove numero, en kiu frontpaĝe aperas foto de malaperinta kamarado. La tempopaso senkompate falĉas inter niaj vicoj. Aldone al la tri ĉi-numeraj omaĝitoj, ni ricevis sciigon pri la lastatempaj forpasoj de du pliaj fidelaj aktivuloj, anoj de nia LEA-Komitato, Carlo Bourlot kaj Ron Lynn. La tero estu malpeza al ili. Feliĉe, novuloj iom post iom alvenas kaj transprenas la torĉon. Kribo mem siatempe estis inter tiuj, kiuj alportis freŝan venton al SAT. Kaj ĝuste ĉi-numere aperas traduko lia, omaĝe al la Pariza Komuno, kiu antaŭ 150 jaroj donacis al la tutmonda laboristaro 72 tagojn da plu meditendaj spertoj. Pri tiu ĉi grava jubileo vi havos okazon denove aŭdi okaze de la SAT-kongreso. Ne hezitu tuj aliĝi kaj proponi programkontribuon.

Pri la vigleco de nia interna vivo atestas la ĉi-fojaj multaj reagoj al pasintfojaj artikoloj. Sennaciulo estas je ĉies dispono por ebligi interŝanĝojn de informoj kaj de opinioj, en laŭeble plej kamaradeca etoso. Ankaŭ la apero de pluraj kontribuoj en la rubriko “SAT-anoj aktivas” estas kuraĝiga signo. Ĉu venontfoje ankaŭ vi rekte partoprenos en tiuj interŝanĝoj? Ĉiu el ni nepre havas ion valoran partigindan kun la aliaj.

Rilate administraĵojn, vi trovos en ĉi-numero la detalajn rezultojn de la voĉdonado por la Plenum-Komitato kaj Ĝenerala Konsilantaro. La raportoj pri la agado de ĉi tiuj instancoj inter junio 2020 kaj majo 2021 aperos en la venonta numero. Ankaŭ pri ili eblos interŝanĝi dum la kongreso.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redakto-skipo

**Frontpaĝa bildo:**

**Christian Baudé (Kribo)**
1939 - 2021

# Enhavo

**Nekrologo**
4 Christian Baudé (Kribo)
6 Mihailo Nešić
6 Václav Stiburek
**Historio**
7 La Pariza Komunumo
9 Memore al Kropotkin en la centjariĝo de lia morto
12 La Pariza Komunumo
13 La Pariza Komunumo
**Tra la mondo: Usono**
13 Dekstrula sindromo
15 Trump forpardonis kvar dungsoldatojn de Blackwater
16 Firmaj rilatoj kun la povo
**Tra la mondo: Eŭropo**
17 Ĉu agitado en la rusa lingvo estas disfendigo de la socio?
**Vegetara Sekcio**
18 “Vakcinu viajn bubojn” kontraŭ “ĉesu manĝi viandon”
**Beletro**
20 Hispana somero
25 La milito de la kontraŭ-kristnaskŝtipuloj
40 Unua de majo
**Opinioj - Reagoj**
26 Dekstraj-maldekstraj aliancoj
27 Alia mondo - ĉu eblas?
28 Judoj en Albanio
29 Virusa kredo
29 Ekstremdekstra viruso
30 Stranga pafado
**SAT-anoj aktivas**
31 Sindikatanoj vizitas la urbon Sapporo
32 Nia esperanta libro en ordinara librejo
32 Jutub-kanalo de SAT: kontribuojn ni petas!
**El la LEA-oj**
33 ASELT
**Tra Esperantio**
34 Kapitalisma atako kontraŭ Esperanto en Japanio
36 La Interna Ideo en Afriko: Asocio Nova Familio
**El la SAT-administrejo**
39 Voĉdonado 2021

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***

# Christian Baudé (Kribo) - 30151

## (1939 - 2021)

Anstataŭ pri sia mizera infanaĝo en kabano funde de la pinarbaro ĉe la Arkaŝongolfeto, Kribo preferis paroli pri la instruoj de sia instruisto Rolando Levreaud en la mezlernejo de La Teste. Inter tiuj, literaturo, ĵazo kaj esperanto. La internacian lingvon li ellernis dum la militservo en Nord-Afriko. Pune pro kontraŭstaro oni sendis lin en disciplinan fuorton meze de Saharo-dezerto. En 1957, 18-jara Kribo aliĝis al SAT kaj li kunanimadis la viglan junulfakon per debatoj, diverstemaj ĉenleteroj kaj eldonado de petola organo *La Juna Penso*.

Li sukcesis ekzamenon, profesie iĝis fervojisto kaj ricevis postenon kiel helpanto kaj poste estro de la stacidometo de Laroque-Timbaut (Lot-Garonio). Tie sian karieron li komencis, senpaŭze daŭrigos... kaj finos! Li efektive rifuzis ĉiujn promociojn kaj rezistis transpostenigon ĝis emeritiĝo. Lia argumento estis tia: "En tiu perdita stacidometo haltas malmultaj trajnoj. Kelkaj frumatene, aliaj vespere, sed dum la tago tre maloftaj. Tial la deĵoro estas nek kapdolora, nek temporaba. La pasaĝeroj estas vilaĝanoj, kiuj veturas por studi aŭ labori en la ĉefurbo Aĝeno. Mi delonge konas ĉiujn kaj reciproke." En la atendoĉambro li starigis teniso-tablon, aŭdigis ĵazon. Sur la supra etaĝo, la familia loĝejo. Kribo edzinigis Solanĝan kaj naskiĝis du filoj Jacky kaj Yves.

Sed plej grave, malantaŭ la oficejo de la staciestro, ĉambro estis dediĉita nur al esperanto-presejo! Kaj jarojn post jaroj Kribo eldonis kaj reeldonis plurcentope jen gazetojn kiel *La Juna Penso*, jen revuojn kiel *Laŭte!*, jen broŝurojn (pli ol cent kvindek). Ĉiuj en plej malferma SAT-spirito. Kvazaŭ lingvoprotektanto, kiel senskrupula korektanto, li kolektis, korektis ankaŭ tradukis artikolojn por fine ilin publikigi. Eĉ se la temo ne vere lin interesis, eĉ se la ideojn li entute malaprobis, li opiniis devon lasi la liberan esprimon al ĉiu. La kontraŭuloj rebatu! Kaj tion li ne malofte faris, eĉ se lia plumo ne ĉiam samnome subskribis la artikolojn. Lia presmaterialo evoluis kun la modernigo de la teknikoj. Tamen li plej ofte permane arte laboris. Kiom da miloj da folioj li presis, faldis, grupigis, gluis, kaj sendis al abonantoj, kies liston li administris kaj kotizojn registris. La loka papervendisto frandis liajn mendojn. Li regule aperis inter la plej bonaj klientoj. Tamen li mem kvalifikis sin nur kiel "la balaisto de la stacidomo"! Vere lian ĉefkaskedon li tre malofte surmetis, nur kelkajn minutojn, por surkaje gaje akcepti trajnon, kiun unu minuton poste li reforsendis, foje por amuzi turistojn per blovo tra sia fajfilo, plej ofte silente per simpla signo de la ruĝa flageto.

La familiaj enspezoj restis malaltaj sed sufiĉis al Kribo kaj Solanĝa por feliĉe kunvivi. Solanĝa bredis anseridojn kaj anasidojn ĉe maljunulino, kiun ŝi dumvive flegis en ŝia malnova akvo-muelejo. Post forpaso de ĉi virino kaj emeritiĝo de Kribo, la paro ekloĝis en tiu muelejo. Dum jaroj tie regis



Kribo kun sia filo Lulu kaj edzino Solanĝa (1985)



Kribo (2014)

kortobirdoj en SAT-spirito. Laŭeble Kribo venigis ankaŭ esperantistojn kaj la kampoj apud la muelejo akceptis tendojn kaj ruldomojn. Pluraj renkontiĝoj, kelkaj eĉ tutsemajnaj, okazis tie, kun diskutoj kaj kantoj borde de la rivereto, sub ombro de la platanoj, dum prunokolektoj... Ankaŭ infanoj plene ĝuis la lokojn kaj la okazojn tie kuniĝi. Tute libere. Kompreneble Kribo nodis fortajn rilatojn kun multegaj homoj. Siajn ideojn li konvinke defendis per argumentoj, trafaj ekzemploj kaj plejparte per personaj kaj familiaj spertoj. De siaj geamikoj li ricevis abundajn librojn, i.a. de Denise kaj Henrique Castello, Valo, Gastono Fournier, Petro Jayer kaj Dazun, k.a. Kaj la biblioteko de la muelejo enhavis pli ol tri mil librojn kaj dokumentojn, kiel jam skribite en la novembra/ decembra numero de *Sennaciulo* lastjare.

Kaj kompreneble lia aktivado ne estis nur esperantlingva. Li loke agadis en multaj rondoj jen kontraŭmilitistaj, jen kontraŭklerikaj, jen kontraŭ atom-energiaj, favore al naturo. Li, kiu kolektis sovaĝajn plantojn kaj fungojn, denuncis longe antaŭ la ekologia modo la agrikulturajn praktikojn, kiuj detruis la kamparon. Tiun kvietan kamparon, kie staris la akvomuelejo, en kiu li pasigis sian emeritan tempon kun Solanĝa. Tiu paro donis animon al tiu malnova muelejo. Dank' al ili tie renkontiĝis dum jaroj esperantistoj kaj homoj, paroj, familioj, kiuj kiel ili fuĝis el la konsumsocio. Kaj tiu verda rifuĝejo iĝis nekomparebla interŝanĝo-centro. Meze de la anseroj kaj anasoj breditaj de Solanĝa, de la revuoj, broŝuroj kaj diskoj de Kribo. La vizitintoj konservas neforviŝeblajn memoraĵojn de siaj spertoj tie.

Ĝis 2010 kaj la 210a numero de *Laŭte!* Kribo senlace publikigis. Li ja tre bedaŭris, ke neniu, neniuj, transprenis liajn taskojn. Sed fortoj ekmankis al li. Tempo, energio, sperto, intereso, kompetenteco mankis al la aliaj. Ĉu veras la aserto, ke neniu estas neanstataŭebla?:

Subite neatendite forpasis Solanĝa en decembro 2019. Kaj jam Kribo mense malsaniĝis. Perdinte siajn markojn, li ne plu emis vivi. Liaj lastaj monatoj estis malfacilaj. Li ne plu povis aŭtonome restadi kaj tial pasigis longajn monatojn jen en psika hospitalo, jen en speciala maljunulejo. Ĝis lastnokte.

Forpasis viro, kiu dediĉis sian tutan animon por travivi kaj vivigi kiel eble plej SATece for de kaj kontraŭ la kapitalisma influo. Liberecane.

SAT kondolencas al liaj filoj, genepoj kaj proksimuloj.

Marcelo (32846):
*La 10an de aprilo 2021*



**Kribo (1987)**



**Kribo, la staci-estro en la stacidometo de Laroque-Timbaut, tutmonde fama presejo de *La Juna Penso* kaj *Laŭte!* Eldonejo de la SAT-broŝurservo.**